tejo:aktuale

n°519 | Aŭgusto 2026

**Bonvenon, karaj legantoj, al la aŭgusta eldono de TEJO-aktuale!** ☀

La eventpinta sezono finiĝis, uff... Post intensa tempo de UK kaj IJK, ni revenis al Roterdamo iom lacaj, sed en bonaj humoroj. La revenvojaĝo de IJK daŭris tutan semajnon kaj kondukis nin tra pluraj francaj urboj antaŭ ol ni finfine revenis al nia kutima (nu, kiom kutima estas la volontula?) vivo en Roterdamo.

Nun ni ripozas kaj ĝuas pli trankvilajn momentojn, dum du el ni jam denove forvojaĝis por ĝui siajn feriojn. Intertempe ni subtenas unu la alian en la batalo kontraŭ la postkongresa sindromo kaj iom post iom prepariĝas por la sekvaj paŝoj.

Ĝis la fino de nia volontula periodo restas ankoraŭ iom da tempo, kaj ni intencas ĝin profiti kiel eble plej multe: laborante, planante, ĝuante la vivon en Nederlando kaj, kompreneble, amuziĝante kune.

Ni deziras al vi agrablan legadon!

# OKAZINTAĴOJ



## IJK 2026 en Tiana

De la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto Internacia Junulara Kongreso kunigis junajn esperantistojn en Tiana, Katalunio, kun la kongresa temo **"Naturo el la homaj okuloj"**.

Dum la semajno okazis multaj programeroj: prelegoj, diskutrondoj, atelieroj, kursoj, koncertoj, kulturaj programeroj, ekskursoj kaj multaj aliaj aktivaĵoj. Ne mankis gufujo, trinkejo, karaokeo kaj diversaj lokoj por kunveni kaj libere babili.

Specialan lokon okupis la katalunaj kulturo kaj lingvo, kiujn partoprenantoj povis ekkoni dum ekskursoj kaj aliaj programeroj. Okazis ankaŭ la Junulara Movada Foiro, la Malferma Horo de la Estraro kaj la Komitatkunveno de TEJO.

Rigardu la belan fotaron de la evento!

# AVERTO




## Postkongresa sindromo: revenas la simptomoj!

Se vi partoprenis IJK-on, vi verŝajne jam konas la simptomojn: manko de dormo, troa sopiro al amikoj kaj neklarigebla deziro tuj aliĝi al la sekva Esperanto-evento. Tio nomiĝas **postkongresa sindromo (PKS)**.

Feliĉe, la kuracado estas simpla: baldaŭ revidi ĵus ekkonitajn amikojn kaj refreŝigi malnovajn kontaktojn aliĝante al la venontaj aranĝoj. Kaj eĉ se vi ne partoprenis IJK-n, preventa kurac-dozado neniam estas malbona ideo. ☺

Jen, sube, kelkaj eventoj, kiuj povas helpi vin kontraŭbatali la simptomojn de PKS – kaj se oni povas partopreni ĉiujn, kial ne fari tion por onia mensa sano?

---

# EVENTOJ




## Jam eblas aliĝi al la venonta Junulara Esperanto-Semajno!

La Novjaron ni festos de la 27-a de decembro 2026 ĝis la 3-a de januaro 2027 en Vilno, Litovio, kune kun junuloj el diversaj partoj de la mondo.

Atendas vin semajno plena je koncertoj, dancado, kantado, ludoj, diskutoj, ekskursoj kaj, kompreneble, multe da babilado en Esperanto. La programo proponos kaj trankvilajn momentojn kaj viglajn noktojn, do ĉiu povos trovi ion por si.

Ĉu vi volas pasigi la Novjaron kun malnovaj kaj novaj Esperanto-amikoj? **Aliĝu nun!**




## IJK 2027: ni revidos nin en Germanio!

La IJK-flago jam transiris al la sekva gastiganto! Dum la ferma ceremonio de IJK en Katalunio ĝi estis transdonita al la organizteamo de **IJK 2027**.

15–22 aŭgusto 2027
Petzow, proksime al Potsdamo kaj Berlino

La kongresejo situas sur duoninsulo ĉe la lago Glindower See kaj disponas pri propra plaĝo, diversaj loĝeblecoj kaj subĉiela scenejo. Atendos nin ankaŭ la kutima IJK-kombinaĵo de koncertoj, gufujo, trinkejo, ekskursoj kaj programo de la frua mateno *ĝis la nokto, nokto-fin'!*.

Kaj estas bona kialo aliĝi jam nun: **ĉiuj, kiuj aliĝas ĝis la 31-a de aŭgusto 2026**, ricevas la kongresan T-ĉemizon senpage. Poste ĝi kostos aldone (12 eŭrojn).

Hastu por rezervi vian lokon kaj vian T-ĉemizon. Ni vidos nin en Petzow!

---

## ALVOKOJ

### Fariĝu tradukmanaĝero ĉe Global Voices Esperanto Lingua 🌍

Global Voices estas cifereca amaskomunikila iniciato, kiu publikigas rakontojn el la tuta mondo por akceli pli bonan interkompreniĝon trans nacioj, kulturoj kaj lingvoj. Volontuloj de la projekto Lingua tradukas tiujn rakontojn en dekojn da lingvoj por ne nur kreskigi la legantaron de tiuj rakontoj, sed ankaŭ pliigi la ĉeeston de sia lingvo interrete kaj plifortigi sian personan tradukpraktikon.

Nuntempe **estas serĉataj volontuloj** por la mastrumado de la retejo Global Voices en Esperanto (Tutmondaj Voĉoj). Kandidatiĝu nun!

**Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!**

## tejo: ~~aktuale~~ eventuale

Ne ĉiuj novaĵoj devas esti gravaj, kaj kelkaj estas simple tro interesaj por resti nerakontitaj.
Jen kolekto de strangaj okazuntaĵoj, novaj tradicioj, dubindaj esploroj kaj rakontoj el la alternativa TEJO-universo. Ĉu ili estas kompleta malveraĵo? Tion ni lasas al vi decidi. ⚡

### Batalado dum IJK 2026!?

Laŭ anonima atestanto, dum unu el la noktoj de IJK okazis batala incidento inter eksa prezidanto kaj oficisto de TEJO. Ambaŭ laŭdire suferis vundojn, kaj la situacio ŝajnis sufiĉe grava, ĝis evidentiĝis,




ke la du „batalantoj“ fakte estis en malsamaj lokoj kaj ambaŭ vundiĝis pro tute senrilataj akcidentoj, kiujn iu kunigis en unu aparte interesan rakonton.
Ambaŭ vunditoj estis atente prizorgitaj de medicine sperta partoprenanto kaj baldaŭ revenis al plena ĝuado de la evento.




## Elektu la vizaĝon de JES 2026-2027

Post du tre sukcesaj provoj dum IJF kaj IJK naskiĝis nova TEJO-tradicio, iniciatita de la volontuloj: por ĉiu granda evento oni elektas unu partoprenanton, kies vizaĝo aperos tie, kie ri malplej atendas ĝin, kaj senĉese akompanos la aliajn dum longa tempo.
Ĉu la tradicio travivos ĝis la venonta JES en Litovio, dependas ankaŭ de vi – jam estas tempo trovi la sekvan vizaĝon de granda TEJO-evento! La elekto por JES 2026-2027 jam komenciĝis, kvankam la kandidatoj ankoraŭ tute ne scias, ke ili kandidatas. Viaj proponoj estas bonvenaj ĝis la unua tago de la evento!




## IJK anoncas revolucian programon!

La organizantoj de la venonta IJK promesas solvi la eternan problemon de samtempaj interesaj programeroj. Ĉiuj prelegoj okazos samtempe en unu loko. La organizantoj esperas, ke tio finos la demandon „Kion mi elektu?“ unufoje por ĉiam.
Krome, la Kongresa Komisiono de TEJO ordonas, ke oni laŭeble serĉu ekde nun kongresejojn kun granda naĝejo, tiel ke ĉiuj partoprenantoj povu ĝui la program-er-aron en refreŝiga etoso.




## Monumento provizore restas nefinita

La estro de Šventoji, la urbo kiu gastigis IJK-n en 2024, aprobis la konstruadon de monumento omaĝe al *Esperanto Senlime 2*. La skulptisto tamen rifuzas komenci la laboron antaŭ la oficiala apero de la dua sezono, ĉar "la rakonto ankoraŭ ne finiĝis". Dume la lokaj loĝantoj pripensas simple instali grandan ekranon en la sama loko kaj atendi komunan spektadon de la unua ĉapitro de la dua sezono.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2026 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands